# Svisa Esperanto-Societo informas

1998 numero 2a: marto

Redakcio: Claude GACOND, Poŝtfako 5031, CH-2305 La Chaux-de-Fonds 5
☎ ĉe C.D.E.L.I.: 032 967 68 55, hejme: 032 926 52 32
Fakso:ĉe CDELI: 032 967 68 29: indiki: por Claude Gacond

# Vivo de SES

## Lasta pretiĝo al la Ĝenerala Jarkunveno de SES

**Basel: 21 marto 1998: 14-16 h**
**Eklezia Centro Riehenring 129**

## Bilanco 1997 kaj buĝeto 1998

En ***SES informas*** **1998-1** ne aperis la diskutotaj **bilanco 1997 kaj buĝeto 1998 de SES**.

Tiun ĉi raporton vi trovas sur la 2a paĝo de tiu ĉi ***SES informas*** **1998-2**, kiun vi do ankaŭ kunprenu en Basel.

Ni profitas la okazon por esprimi la esperon, ke multaj venos en Basel almenaŭ por partopreni la jarkunvenon.

La redaktoro: Claude Gacond

# Vorto

## de la prezidanto pri la artikol-rikoltado

Kiel vi legis en nia bulteno ***SES informas*** **1998-1**, la SES-Estraro post rea ekzamenado rezignas ekde marto al la abono de Argus. Tiu servo ne indas kompare al la rezultantaj kostoj. Ni devas uzi la monon pli efike. La Estraro volas do mem organizi la observadon kaj kolektadon de gazetartikoloj kunlabore kun la lokaj grupoj kaj kun la membroj.

**Ni petas la grupojn komisii estraranon pri tiu tasko**, plej bone estraranon, kiu okupiĝas pri la loka informado. Li organizu la observadon kaj kolektadon regione kaj loke, helpe de interesitaj membroj.

(Sekvo sur la paĝo 3a)

# BILANCO 1997 kaj BUĜETO 1998 de SES

| JARKALKULO | BUĜETO 97 | KALKULO 97 | BUĜETO 98 |
|---|---|---|---|
| Membrokotizoj | 8'550.- | 7'215.- | 7'500.- |
| Abonoj (sen membreco) | 600.- | 315.- | 400.- |
| Donacoj | 800.- | 14'765.90 | 1'500.- |
| Donacoj Agado 2003, enspez. | 2'400.- | 1'443.- | 1'500.- |
| Interezoj CS-ZH, GEP 96, malnetaj | 1'000.- | 1'238.50 | 1'500.- |
| ENSPEZA SUMO | 13'350.- | 24'977.40 | 12'400.- |
| INFORMADO, PUBLIKAJ RILATOJ | | | |
| Informado, varbado | 3'000.- | 948.75 | 5'000.- |
| Omaĝoj, Laborrimedoj | 50.- | 0.- | 50.- |
| Argus | 1'500.- | 1'481.90 | 260.- |
| Subvencioj | 900.- | 300.- | 1'200.- |
| Agado 2003, elspez. | 0.- | 110.- | 200.- |
| | 5'450.- | 2'840.65 | 6'710.- |
| SERVOJ | | | |
| Literatura Foiro (aŭ Heroldo) | 5'450.- | 5'448.- | 4'500.- |
| SES Informas | 2'100.- | 1'818.35 | 2'000.- |
| Kunvenoj (ĜK k.s.) | 450.- | 0.- | 800.- |
| | 8'000.- | 7'266.35 | 7'300.- |
| ADMINISTRADO | | | |
| UEA-kotizo | 200.- | 129.50 | 150.- |
| Administraj kostoj | 900.- | 2'381.15 | 2'400.- |
| Bankspezoj, Diversaĵoj | 300.- | 304.20 | 300.- |
| | 1'400.- | 2'814.85 | 2'850.- |
| ELSPEZA SUMO | 14'850.- | 12'921.85 | 16'860.- |
| GAJNO/MALGAJNO | -1'500.- | +12'055.55 | -4'460.- |

| KAPITALO SES (CS-ZH,GEP,CG,UBS) | | AKTIVOJ | PASIVOJ |
|---|---|---|---|
| GEP, konto 079 (sen interez.97) | | 15'541.85 | |
| UBS, KCE favore SES | | 3'900.- | |
| Inventaro | | 1.- | – |
| CS-ZH, nova ŝparkonto | | 29'061.35 | |
| CS-ZH, kuranta konto | | 12'455.80 | |
| CS-ZH, fonduso Agado 2003 | | 7'304.60 | |
| Varbsumo disponebla ĉe CG | | 127.20 | |
| CS-ZH (sen GEP 97) ant. imp. bonhavo ĉe ESV | | 168.40 | |
| Transaj eroj aktivaj k. pasivaj | | | 0.- |
| KAPITALO je 97-01-01 | 57'877.45 | | |
| plus GAJNO | +12'055.55 | | |
| minus el varbsumo ĉe CG | - 1'372.80 | | |
| KAPITALO je 97-12-31 | 68'560.20 | | 68'560.20 |
| | | 68'560.20 | 68'560.20 |

| REZERVA KAPITALO (CS-Winterthur) | | | |
|---|---|---|---|
| CS-Wi, ŝparkonto | | 11'087.55 | |
| CS-Wi, ant. imp. bonhavo ĉe ESV | | 70.65 | |
| REZERVA KAPITALO je 97-01-01 | 11'959.35 | | |
| plus interezoj malnetaj | + 201.85 | | |
| minus favore AG 2003+ĝirspezoj | - 1'003.- | | |
| REZERVA KAPITALO je 97-12-31 | 11'158.20 | | 11'158.20 |
| | | 11'158.20 | 11'158.20 |

97-12-31 Ernst von MAY, kasisto

# artikol-rikoltado

## (sekvo)

Ni celas la kolektadon de artikoloj aŭ elsendoj pri esperanto:

**A.** kiuj rezultas de informa agado de la lokaj grupoj, de membroj aŭ de la Gazetara Servo de SES;

**B.** kiuj estas la produkto de redakcio aŭ de ekster-esperanta medio;

**C.** kiuj mencias esperanton eĉ nur metafore, simbole, bilde.

**D.** Ankaŭ estas kolektindaj la artikoloj, kiuj ne mencias esperanton, sed kiuj lingvo-politike estas interesaj aŭ signifaj.

Aldone al la kolektitaj artikoloj ĉiam devas esti menciitaj la **titolo de la gazeto**, la **aperdato kaj gazeta numero** kaj fine la **redakcia loko**. Tiuj artikoloj **estu sendataj al Svisa Esperanto-Societo, Jurastr. 23, 3063 Ittigen.** ☎ 031 921 44 59.

Post ekzameno de la ricevita materialo SES sendos ĝin al CDELI por arkivigo.

Kiam aperas kontraŭ-esperanta artikolo, rekomendindas tuj informi:

- **se germanlingve**: SES, Jurastr. 23, 3063 Ittigen.
- **se franclingve**: CDELI, CP 5038, 2305 La Chaux-de-Fonds. ☎ 032 967 68 55. Fax: 032 967 68 29.
- **se itallingve**: TEL, Viale G. Motta 32, 6500 Bellinzona. ☎ 091 825 29 88. Fax: 091 821 41 89.

Ni kalkulas je via bonvolemo kaj akurateco, antaŭdankas kaj salutas plej kunlaboreme

La prezidanto: Bruno Graf.

# WIL

### Esperanto-Klubo Wil

S. POCHANKE, Letenstr. 70, 9500 Wil. ☎ 071 911 68 30. **Kunvenoj**: unua merkredo de la monato 20.00 en la Restoracio Schweizerhof, Unt. Bahnhofstr. 18.

**Aprilo 1**: 39a Internacia Fervoj-ista Esperanto Skisemajno en Maribor (Slovenio). Rakontos kun lumbildoj B. kaj S. Pochanke.

**Majo 6**: Prelegos s-ino Anita Alther el Triesto.

# *S.E.S. informas*

Por la venonta numero de *SES informas*, kiu aperos komence de majo **la redakcia limdato estas la 15a de aprilo 1998**.

P.P.
CH-2305
La Chaux-de-Fonds 5

# Jubileo de la homaj rajtoj

**Universala Esperanto-Asocio** (kunlabore kun **SES**, **Laŭzana Esperanto-Societo** kaj **La Stelo** organizos plurajn aranĝojn en Genève, dediĉe al la 50jariĝo de la ***Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj*** kaj omaĝe al la 90-jariĝo de UEA.

**Renkontiĝo por esperantistoj**, lundon, la 27an de aprilo (vespere), kun pluraj eminentuloj de la esperanto-movado, interalie la prezidanto de UEA, Lee Chong-Yeong. La renkontiĝo okazos ĉe *Institut national genevois*.

**Simpozio pri "La lingva dimensio de homaj rajtoj"**, mardon, la 28an de aprilo, de la 10a ĝis la 18a horoj, ĉe Unuiĝinta Naciaro. La programo antaŭvidas prelegojn de fakuloj reprezentantaj la esperanto-movadon, la hom-rajtajn organizojn kaj la Altan Komisionon pri Homaj Rajtoj de UN. Invitataj kiel observantoj (sen diskut-intervenoj) estas funkciuloj de Neregistaraj Organizoj kaj reprezentantoj de la esperanto-movado. La simpoziaj lingvoj estos ĉefe la angla kaj ankaŭ esperanto kaj la franca.

Merkredon, la 29an de aprilo, matene **gvido tra la iama kvartalo de UEA** en Genève kaj posttagmeze **vizito de CDELI** en La Chaux-de-Fonds. Sekvos vespera programo kun ĉaudefonaj esperantistoj.

La lunda kaj merkreda programoj estas publikaj: ĉiuj esperantistoj kaj amikoj de esperanto estas bonvenaj. Ĉiuj interesatoj, ankaŭ por la marda simpozio kiel observantoj, bonvolu peti la detalan programon kaj invitilon al la reprezentanto de UEA ĉe UN: s-ro Andy Künzli, Eigerstrasse 78, 3007 Bern (plej malfrue ĝis la 31a de marto).